FN Per ANC 47


N°254 MAJO 2013

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

# ESPERANTO - NORMANDIE



Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot-sur-Seine.
Tel. 02 35 34 28 78 LEMARCHANDPI@wanadoo.fr



Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.



La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.


## *NIA ĜENERALA ASEMBLEO OKAZOS en BRICQUEBEC*

## *SABATON 22an de JUNIO*

Karaj amikoj,

Bricquebec ? Kial do Ĝenerala Asembleo en Bricquebec ?

Nia regiono estas vasta, ofte malbone konata de la normandanoj mem. Sed bonŝance la normandaj esperantistoj sufiĉe dise loĝas de la nordo ĝis la nudo, de la okcidento ĝis la oriento, por organizi ĉiujare tre malsamajn kaj allogajn ĝeneralajn kunvenojn.

En 2013, la Ĝenerala Asembleo okazos en Bricquebec ĉar en junio ni akceptos du japanojn prelegvojaĝantajn en Francio. Bricquebec ? Japanio ? Kiuj rilatoj ?

***Unue*** ĉar Hori Jasuo, depost la katastrofo en Fukuŝima regule retinformas la esperantistaron pri la evoluo de la tiea situacio. Hori Jasuo kaj Arai Toŝinobu prezentas dum sia turneo sukcesoplenan prelegon pri tiu temo kaj tre certe interesos ilin vidi la nuklean centralon en Flamanville kaj la COGEMA uzinon en Beaumont Hague.

***Due*** ĉar la fama abatejo de Briquebec havas historian ligon kun japanaj abatejoj.

***Trie***, ĉar Lanti, iniciatinto de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), naskiĝis en Nehou, apuda vilaĝo


***Kvare***, ĉar proksimas Cherbourg, Coutances, Granville kie (aŭ apude) loĝas kaj aktivas pluraj samideanoj. ***Fine***, ĉar la regiono estas ĉarma kaj vizitinda kun kamparo dolĉa kaj marbordo pitoreska.

Surloke, nia amiko Pastro Mark bone aranĝis la aferon. Ni kunvenos en la urbestrara ĉambro kaj dufoje manĝos en la Abatejo mem !

Vere, tiu Ĝenerala Asembleo enhavos tre interesan programon kaj okazos en vizitinda loko.

Ni esperas vian partoprenon !

***Yves NICOLAS***



***HORI Jasuo***

LILLE 2015 esperanto Ni subtenas!

## *En tiu numero :*


| | |
|---|---|
| Flamanville, Bricquebec. | 2 |
| Ĝenerala Asembleo. | 3 |
| Mireille Grosjean. | 4 |
| St Pierre Varengeville. Alfred Talpied. | 5 |
| Pri fortaj saporoj. | 6 |

## *ĈU VI SCIAS, KE..... ?*

**... En Flamanville** ekzistis **la Kaverno de Baligano** antaŭ la konstruado (1978) de la Atomenergia Centralo. Ĝi atingis 200 metrojn en la kerno de la klifo.

La fluso, impete enŝoviĝanta en la klifon, eligis terurajn bruegojn. Pri tio atestas loka legendo : unu drako kaŝita ene, teruris la loĝantaron, kiu devis oferi homajn viktimojn, precipe infanojn, por kvietigi la monstron. Tia situacio daŭrigis ĝis la alveno de irlanda monaĥo, Sankta Germano (448 p. j.c.), kiu venkis la Beston. La monstro estis ŝtoniĝita en bloko de granito rustita per la fera erco, kies koloro elvokis la sangon de la oferitaj senkulpuloj.

La deveno de la vorto Baligano restas mistera. Neniu sukcesis alporti kontentigan etimologion. Hodiaŭ la Kaverno de Baligano malaperis. La Atomenergia Centralo anstataŭis la bestokavernon. En la jaroj 1980, la fosado de la klifo kaj la detruo de la kaverno estigis abundan literaturon. Certe, la teksto la plej interesa estas dialekta (normanda) poemo verkita de **Louis Lohier, Côtis-Capel (plumnomo)** en lia kajero « Le Grand Câté », en kiu li atakas la inĝenierojn kiuj konstruis la nukleajn reaktorojn.

En lia poemo la drako fariĝas giganta polpo, kies tentakloj kapablas etendiĝi sur la tutan ĉirkaŭaĵon. (Mark)

Unu tagon, gravuloj vizitis nin.

Fiereguloj, fanfaronuloj, arogantuloj :

Laŭdire, konsilanoj, deputitoj.

Multaj ili estis, tre multaj, sennombraj

Vestitaj laŭ la Pariza modo

Per ŝuoj ne taŭgaj ĉe ni, kamparanoj.

Nu, ni veturigis ilin per aŭtoj

Ĉar ili ne volis makuli siajn belajn ŝtrumpetojn.

Aliaj sekvis ilin : Scienculoj ili estis.

*(eltiraĵo de la poemo de Côtis-Capel. La tutan poemon ni disdonos dum la Ĝenerala Asembleo)*


**.... Bricquebec** venas de la skandinavaj vortoj **brekka (deklivo, monteto)** kaj **bekkr (rojo)**. Tamen kelkaj fakuloj asertas, ke « Bricque » venas de la malnova angla **bruĉĝ (ponto).**

**... La cistercia Abatejo de Bricquebec estis fondita en 1824** kaj forte implikiĝis en la starigo de 7 cisterciaj abatejoj en Japanio. Nome Tobetsu (1896), Tenshien (1898), Nishinomiya (1935), Imari (1953), Nabu (1954), Oita (1980), Ajimu (1981). (la kompleta rakonto de Mark estos disdonita dum la Ĝenerala Asembleo).

## *HORI Jasuo kaj ARAI Toŝinobu*

Jam de pluraj jaroj, ili ĉiujare prelegvojaĝas en Francio pri tre diversaj temoj en rilato kun sia lando, Japanio. Lastjare, ilia prelego pri Fukuŝima havis tre grandan sukceson : pli ol 600 homoj ĉeestis ĝin en 7 urboj.


En junio 2013, ili ankaŭ prelegos en Le Mans, Châteauroux, Bouresse (Kvinpetalo), Tours kaj Hérouville Saint-Clair.




**Por tranoktado en BRICQUEBEC**
Hoteloj, Kampadejoj, « Chambres d'Hôtes, Gîtes » :
**Office Tourisme** 13 place Sainte Anne.
50260 Bricquebec.
Tel. : 02.33.52.21.65
**www.officedutourisme-bricquebec.com**

## NIA ĜENERALA ASEMBLEO OKAZOS en BRICQUEBEC (50), SABATON 22an de JUNIO 2013a

***PROGRAMO :***



**Bricquebec blazono**

10 H 00 : Akcepto en la urbestrara ĉambro.

10 H 30 : Publika prelego de Hori Jasuo kaj Arai Toŝinobu pri la JAPANA KULTURO en la urbestrara ĉambro.

12 H 00 : Aperitivo oferita de la Urbestraro en la urbodomo.

12 H 30 : Tagmanĝo en la Abatejo « La Trappe ». Ĉiu alportu pladon.

14 H 00 : Ĝenerala Asembleo de Esperanto-Normandie en la urbodomo.

16 H 00 : Paŭzo.

17 H 00 – 18 H 30 : Publika prelego de Hori Jasuo pri la katastrofo de Fukuŝima en la urbodomo.

19 H 00 : Vespermanĝo en la Abatejo « La Trappe ».(13 €)

***ĜENERALA ASEMBLEO :*** ***Tagordo :***

Morala raporto de nia asocio

Financa raporto, Normanda Esperanto Bulteno,

Renovigo de la estraro

Raporto pri unuopaj kaj grupaj klopodoj

Kiel pli bone strukturi nian asocion por organizi kaj subteni projektojn.

---

## *KONFIRMILO*

**Nomo :** Propra nomo :

Adreso :

Telefono :

Retadreso :

Kiom da personoj (combien serez-vous ?) : ☐

Ĉu vi vespermanĝos en la abatejo (Dînerez-vous à l'Abbaye, à 19h00 : 13 €) : **NON :** ☐

**OUI :** ☐ Nombre de repas : ☐

Ĉu vi estas vegetarano (êtes-vous végétarien) ? : **OUI :** ☐

Viaj rimarkoj (vos précisions) :

**TAGMANĜO (repas du midi)** Bonvolu alporti pladon/trinkaĵon (merci d'apporter un plat/une boisson pour 2-3 personnes)

Resendu tiun konfirmilon **antaŭ la 1a de junio** (merci de retourner ce bulletin **avant le 1er juin**) à :

**Yves NICOLAS, 14 place Laënnec, 14 000 CAEN. ivnicolas@sfr.fr**

**Mirelle GROSJEAN (el Svisio)** restadis en Caen dum tri tagoj. Ŝi vizitis la pripacan muzeon Mémorial kaj la faman Brodtapiŝon en Bayeux. Kun 8 anoj de la klubo de Caen, ŝi estis tre varme akceptita de la klubo de Flers. La membroj de tiu nova, sed jam vigla klubo, preparis bongustan menuon kiun ni bonetose manĝis en la bela hejmo de Michèle kaj Zef. Zef prezentis kelkajn diaporamojn pri siaj aventuroj en Rusio kaj Kanado kiujn li bicikle trairis. Mirinde !

Mireille lerte kaj humurplene gvidis kurson en Hérouville Saint Clair. Ŝi foriris al Le Havre la 11an de aprilo.



**Mireille Grosjean** (meze de la grupo kun blanka ĉemizo ĉe Michèle kaj Zef, kun klubanoj de Flers kaj Hérouville.

**De tempo al tempo, ne forgesu konsulti la retajn adresojn de Hérouville kaj Le Havre**

**www.gvidilo.org**

**htpp//esperanto-lehavre.org**


**htpp//herouvilleesperanto.blogspot.fr**





---




Trideko da personoj sekvis la prelegon de **Mireille GROSJEAN** en la « Fort de Tourneville » Le Havre, jaŭdon la 11an de aprilo organizita de la grupo de tiu urbo kaj « Société Havraise d' Etudes Diverses ». Artikolo aperis en la loka gazeto « Havre Libre ».





**Freddy TAILPIED**, nia amiko, forlasis nin la 25an de februaro 2013.

Naskiĝinta en 1924, Freddy estis instruisto en publika baza lernejo. En 1968, dum la longa striko de majo, li ekstudis esperanton. Poste dum pluraj jaroj, li instruis ĝin en Trouville.

En Herouville Esperanto li aliĝis en 1990 kaj dum nombraj jaroj fariĝis delegito de UEA (Universala Esperanta Asocio). Krom liaj pedagogiaj kvalitoj, ni ne forgesos lian profundan humanecon, lian afablecon kaj lian konstantan bonhumoron.

Pli ol esperantisto sperta kaj konvinkita ("ĝisoste" diris li), Freddy estis amiko pri kiu nombraj el ni havis veran korinklinon. Ĝis revido, Freddy, ni amis vin

---

**Albert BESSIÈRE** forpasis en Rouen la 3an de februaro. Li estis 88 jaraĝa, « ancien Avocat Général honoraire près de la Cour d'Appel de Rouen. Chevalier de la Légion d'Honneur, Officier de l'Ordre National du Mérite ». Li estis dumjaroj membro de nia asocio, de la grupo de Rouen, de la Normanda Federacio de UFE, de UFE, kaj iam estrarano de Franca Katolika Esperanto-Asocio. Li ripozu pace.



## Saint Pierre de Varengeville


Dank'al **Catherine DOMINGO**, « Office Culturel » kaj la Urbestraro de St Pierre de Varengeville (4500 loĝantoj) apud DUCLAIR (76), monata (dum marto) ekspozicio de libroj kaj de la 12a paneloj de nia asocio okazis en la urba biblioteko. Sur la oficiala reta adreso de la urbo aperis pluraj artikoloj (+ luma informo sur la urbaj paneloj) por informi la enloĝantaron viziti tiun ekspozicion kaj partopreni la 22an de marto debaton pri « espéranto la langue équitable » en la urba festa salono. Ĉeestis dudeko da personoj (vidu la foton); kelkaj el ili intencas partopreni kurson venontan septembron. Foto kaj artikolo aperis en la regiona gazeto : « Courrier Cauchois ».

---

**Cotisation 2013**

*Une croix rouge dans cette case indique que vous n'êtes pas à jour de votre cotisation 2013. Merci d'envoyer votre règlement (8 €uros à l'ordre d' « Esperanto-Normandie ») à l'adresse indiquée ci-dessous. Merci pour votre soutien !*

**KONGRESU en BRICQUEBEC la 22an de junio !**



## Kotizo por 2013

Faru vian ĉekon profite de:

ESPERANTO-NORMANDIE
C.C.P. 283 40 H ROUEN

**Abon-kotizo por 2013 : 8 Eŭroj,**

kaj sendu ĝin al la kasisto :

Pierre Lemarchand,
2 Résidence Les Terres Quemines.
76113 Hautot sur Seine.

## *PRI FORTAJ SAPOROJ*

Filoj, vi min afliktas, kiam cele vin nutri
Vi neglektas la manĝojn de la patroj ŝatitajn !
Via moderna gusto ne plu povas toleri
De festenoj malnovaj la saporojn fortegajn.

Viaj palaj gingivoj, kompatindaj, panikas
Je ideo alfronti malmolan mimoleton (1).
Viaj pudoraj lipoj malestimon afektas,
Se oni vin proponas fumantan tripopladon (2).

Mi ja ne vin sugestas vivi el fazeoloj,
Kiel niaj geavoj, nek el grasa lardo ;
Sed ĉu brasikosupo, livaro (3) de du jaroj,
Ne superas facile kion vin vendas MacDo ?

Vi fikompatinduloj ! Emaj je gustoj strangaj,
Tro palatofendigaj, de la saŭcoj usonaj.
Elvojigitoj ! Perditoj ! Vic'al olda munstero (4)
En iu fastfudejo iri al hamburgero !

Pensu ke afrikanoj sen suferi gorĝiton
Kun delektado glutas batalemajn termitojn,
Elefanton fumitan, kaj ŝiman maniokon ; (5)
Ke saharanoj rostas lokustojn kaj akridojn.

Eskimoj aprezegas balengrasaĵon krudan,
Fokostekon, ursaĵon, kiujn ili pasigas per moruoleaĵo !
Nordindianoj, ili, ŝatas pemikanon (6)
Kiam la romianoj utiligis garumon (7)

Bonvolu vidi nur, en ĉi mia admono,
Kiom ege deziras, da feliĉo kaj bono,
Via maljuna patro al viaj familioj,
Kiuj devus disponi je fortikaj papiloj.

Ĉar ja povus okazi ke ni konu denove,
Dank'al la registaroj elektitaj obstine,
La tempojn de malsato, kiam nepostulemaj,
Ni ne emis al ĝuo, sed al stomakoj plenaj.

Mathieu, 09.4.2013 ***Henri ROUSSEAU***

La plejmulto de la sekvantaj notoj celas la nefrancojn kiuj hazarde povus legi tiun versaĵon, ĉar evidente la francoj, kaj precipe la normandoj, ne bezonas klarigojn pri fromaĝoj kaj tripoj. Ni preterpasante memoru ke generalo De Gaulle estis dirinta ke « Lando kiu kiel Francio posedas pli ol 200 fromaĝojn ne estas regebla » ☺

(1) - **Mimoleto** : Fromaĝo de norda Francio kiu maljuniĝante fariĝas hardega.

(2) - **Tripoplado** : En Normandio, kaj en aliaj provincoj, la jarcentoj de malabundo instigis la malriĉan popolon ankaŭ uzadi stomakojn de bovoj por sin nutri ; tion farante, eble kun malestima subpenso, oni uzis la ne tre taŭgan vorton ''tripoj '' por indiki tiun muskolan organon, tamen iom pli noblan ol la elvokitaj intestoj. Kio ajn estu, imagemaj kuiristoj inventis receptojn kiuj ne nur akceptebligis tiujn organojn, duarangajn kampe de gastronomio, sed faris ke ili provizis prigustan plezuron ... malgraŭ ilia forta odoro kiu ne plaĉas al ĉiuj.

(3) - **Livaro** : forta normanda fromaĝo kies nomo venas de la urbeto Livarot, en departemento Calvados.

(4) - **Munstero** : Forta vogeza (Vosges) fromaĝo kies nomo fontas el la urbeto Munster en departemento Haut Rhin.

(5) - **Ŝima manioko** : Manioko estas tropika planto kies radiko estas tre riĉa je glucidoj kaj kiu havas gravegan rolon pri nutrado de homoj en subsahara Afriko ; sed bedaŭrinde ĝi entenas tre toksan cianhidran acidon, kiu detruiĝas post plursemajna macerado en akvo de marĉoj. Post tiu macerado oni sekigas kaj farunigas la maniokon, el kiu oni pretigas diversajn pladojn ... kiujn oni ĝenerale devas esti malkovrinta dum sia junaĝo por ilin ŝati.

(6) - **Pemikano** : miksaĵo de sekigita, fermentita, pistita bizonviando kaj graso.

(7) - **Garumo** : Forta saŭco el salakvo kaj longe maceritaj fiŝoj, tre uzita de la romianoj por kondimenti pladojn.